


Bulgara **ESPERANTISTO**



1965



INDUSTRIALIMPORT

ŜTATA KOMERCA ENTREPRENEJO

Sofio, str. „Pozitano“ № 3, Bulgario

Telegr. adreso: „INDIMPORT“

Telefono 7-30-21

Teleks 591

EKSPORTAS:

KOTONTEKSAĴOJ:

BLANKAJ KAJ KRUDAJ TEKSAĴOJ: kalikotoj, blanka kotontolo „amerikan“, maldense teksita kotontolo, (gaz)bandaĝo k. a.

STAMPITAJ TEKSAĴOJ: kretono, tobralko, indieno (kolordesegnita), katunoj, fajna fusteno, „Margit“ k. a.

GLATE KOLORIGITAJ TEKSAĴOJ: tiko, sateno, fusteno, ŝtofoj por bluzoj k. a.

POPLINOJ: poplinoj — unukoloraj, striitaj kaj kvadratumitaj.

BUNTAJ TEKSAĴOJ: oksfordŝtofoj, taftoj, matracŝtofoj: jakardaj kaj striitaj, ŝtofoj por kostumoj k. a.

BANMANTELAJ TEKSAĴOJ: bantukoj; banmantela ŝtofo.

CELULOZLANAJ (VISKOZAJ) TEKSAĴOJ: tafto „Jurij“, kvadratumita „Totka“, ŝtofo por kostumoj, ŝtofo „Zdravec“ k. a.

SILKŜTOFOJ:

KRUDAJ: krepo „Sofia“, krepo 2-A, krudsilka tolo IV.

GLATE KOLORIGITAJ: „Vezba“, „Rosica“, krudsilka tolo IV, „Mak“, „Trjavna“ „Karnobat“ k. a.

STAMPITAJ TEKSAĴOJ: krepo „Sofia“, krudsilka tolo IV, krepo 2-A, tafto 12, ĉina tafto, tafto sateno, tafto „lamé“, vualteksaĵo DK, vualteksaĵo sateno, „Rosica“ k. a.

LANAJ TEKSAĴOJ KAJ DORMOKOVRILOJ:

TEKSAĴOJ: glatfadenaj kaj kardlanaj ŝtofoj el lano, viskozo, sintezaj (artefaritaj) materialoj kaj miksaĵoj, por viraj vestoj.

**AL PLI ALTA NIVELO NIA KULTURKLERIGA AGADO!**

Por nia organizita socikultura agado unu el la ĉefaj taskoj estas zorgi pri la ideologia eduklaboro. Tion unuanime rezoluciis ankaŭ la 36-a kongreso, okazinta pasintjare en Pleven. Tio tamen ne signifas, ke ni subtakas la organizajn demandojn. Ĝi, la organiza laboro, estas la motoro de la tuta por- kaj peresperanta agado. Sed societo, kiu dediĉas siajn kunvenojn nur al organizaj aferoj, baldaŭ forpuŝas siajn membrojn, ĉar tagordo, entenanta ĉiam unu kaj saman punktaron, ne estas alloga.

Interesa, varia programo estas grava premiso por vigla societa vivo. Oni devas animi la enuan atmosferon de la organizaj kunvenoj per kulturaj programoj. Tiam la membroj vizitos la kunvenojn ne nur kiel disciplinitaj esperantistoj, sed por liveri iom da ĝuo al sia animo.

Ĉu oni povas realigi tion? Iuj pli multnombraj societoj, kiel en Plovdiv kaj Sofia, okazigas regulajn ĉiusemajnajn kunvenojn kun bona programo. Jen ekz. la laborplano de Plovdiva Esperanto-societo. En ĝi ni trovas, ke tiu societo en siaj kunvenoj aŭskultas monate ĉirkaŭ 4 referaĵojn. Unufoje oni referas pri lingvaj demandoj, aliffoje pri fama verkisto aŭ sciencisto, triafoje okaze de iu kalendara dato ktp.

Laŭ la sama maniero oni agas en pluraj societoj. Tamen oni povas ankoraŭ pli variigi la programojn. Kial ekz. ne organizi teatran trupeton kaj kanthoron? Kial ne redakti „Vivan gazeton“? Tio donos eblon aktivigi pli da membroj, komisiante al ili taskojn. La pli monhavaj societoj povas utiligi la magnetofonan servon, mendante sonbendojn de UEA aŭ de la magnetofona servo ĉe CK de BEA. Oni povas aranĝi lumbildajn prezentadojn, filmajn projekciojn ktp.

Valora kaj kultura estas la internacia korespondado. Iuj societoj, kiel ekz. en Dimitrovgrad, iniciatis ĝemeligon de sia urbo kun itala urbo. Nun en la Jaro de la Internacia Kunlaborado oni devas pliintensigi la internacian korespondadon.

La kuranta jaro estas jubilea por la bulgara Esperanto-movado. Ĝuste antaŭ 75 jaroj en nia lando kelkaj idealistoj metis la fundamenton de la organizita Esperanto-movado. Okaze de tiu jubileo CK de BEA dissendis al la societoj specialan referaĵon. Krome oni povas en ĉiu loko rakonti pri siaj pioniroj; pri la unuaj paŝoj de Esperanto-movado en Plovdiv, Târnovo, Sofio kaj aliloke. Por nia ĝojo kaj feliĉo ankoraŭ vivas malnovaj esperantistoj, kiuj povas rakonti al la juna generacio rememorojn pri si kaj pri la jam forpasintaj pioniroj.

Por ke la tuta kulturkleriga laboro paŝu ritme kaj intense, necesas ke la estraroj de la societoj ellaboru planon, en kiu oni antaŭvidu temojn, kiujn sendas CK de BEA, kaj tiajn de la lokaj kamaradoj. Nur per komunaj

fortoj ni plialtigas la lingvan kaj kulturan nivelon de ĉiu bulgara esperantisto. Nur bone informitaj, altkleraj esperantistoj povas havi aŭtoritaton kiel inter siaj samurbanoj, tiel ankaŭ inter fremdlandaj esperantistoj. Konsciaj pri la neceso de ideoeduka agado, ni senprokraste realigu la decidojn de la 36-a kongreso en Pleven!

NOVA ESPERANTISTA MANIFESTIĜO EN SOFIO

Post la grekaj esperantistoj el Tesaloniko la 30-an de decembro p. j. dekoj da membroj de E-societo „M. Gorkij“ kaj SSES „Vela Peeva“ ĝoje renkontis ankaŭ grupon de beogradaj esperantistoj (precipe gejunuloj). Koraj brakumoj, manpremoj kaj kisoj inter alvenintoj kaj gastigantoj — esprimo de amo kaj sincera amikeco inter la du najbaraj, frataj slavaj popoloj.

La gastojn bonvenigis k-do H. Levi je la nomo de BEA kaj k-do N. Nanov — je la nomo de societo „M. Gorkij“. Al ili respondis la du gvidantinoj de la grupo — N. Subotić kaj P. Stanković. Post pligustigo de la gastprogramo, ĉiuj estis loĝigitaj en la domoj de la sofiaj esperantistoj.

La 31-an de decembro la gastoj kun k-do Benvenisti kaj kelkaj gestudentoj vizitis iujn el la vidindaĵoj de la ĉefurbo. La Novjaron ni komune festis en restoracio „Rodopa“ en kortuŝa amika atmosfero. K-do N. Aleksiev, prezidanto de BEA, bondeziris feliĉon, prosperon kaj novajn sukcesojn surkampe de E-movado al ĉiuj ĉeestantoj. Dankoj kaj kantoj, gajaj ŝercoj kaj rido ĝis la mateno regis inter ni.

Je la unua de januaro la sofiaj gestudentoj-esperantistoj el SSES „Vela Peeva“ plezurigis bonan memoron al la gastoj, aranĝante partoprenon en la Junulara Novjara Balo en la halo „Universiada“.

Tre plaĉis al ĉiuj ankaŭ la ekskurso al Vitoŝa-monto.

Tie post vizito de la loko „Zlatni mostove“ („Oraj Pontoj“) ni vizitis la montodomon „Esperanto“. La estraranoj de la Turista Sekcio „Esperanto“ montaris al ni la dormejon, servoĉambron kaj la ĝeneralan aranĝon de nia montodomo. Sekvis artprogrameto, fotado, promenado, malsupreniro per la lifto.

En la Muzika Teatro ni spektis la opereton „La Feliĉulo“.

La 3-an de januaro ni kun bedaŭro adiaŭis niajn gastojn, donacante al ili diversajn memoraĵojn: la romano „Sub la jugo“ de I. Vazov, „Bulgarino“ k. a. esperantaĵoj. Per varmaj vortoj la gastoj dankis invitante nin al gastado en Beogrado. Ni ĉiuj promesis agi por efektiviĝo de pluaj bonrilatoj kaj paca kunlaborado inter la najbaraj ŝtatoj en la Balkana Duoninsulo.

La lokomotivo ekfajfas, la gastoj envagoniĝis kaj forveturis al Beograd.

Ĝis nova revido, karaj fratoj-geesperantistoj.

M. Benvenisti



La gastoj antaŭ la montodomo „Esperanto“

LA JUGOSLAVIAJ GEESPERANTISTOJ DANKAS

Al
Esperanto-societo
„Maksim Gorkij“
SOFIO

Karaj gesamideanoj,

Jam pasis kelka tempo de nia reveno el via belega urbo Sofio, kie ni pasigis kvar neforgeseblajn tagojn. Via bonege organizita kaj varmkora akcepto ĉe la stacidomo impresis kaj kortuŝis nin. Afabla kaj amika gastigado kaj ĉio, kion ni vidis, kion ni sentis inter vi, restos por ĉiam en niaj koroj kiel la plej bela memoro, precipe en „Mehanata“, kie ni ĝisatendis la Novan Jaron kaj la ekskurso sur Vitoŝa-monto kaj Kopitoto.

Nia granda deziro estas, ke nun vi vizitu nian landon, nian urbon kaj niaflanke ni klopodos fari ĉion eblan por ke vi ĉiuj estu kontentaj inter ni.

La manifestiĝo de nia reciproka esperantista amikeco kaj solidareco kontribuas al amikeco kaj pacama kunlaboro kaj interkompreniĝo de niaj najbaraj landoj, niaj slavaj popoloj.

Elkorajn, sincerajn salutojn al ĉiuj geesperantistoj en via belega Sofio kaj aparte al la membroj de via E-societo, je la nomo de ĉiuj geesperantistoj, kiujn vi samideane gastigis kaj je la nomo de nia estraro, kun niaj bondeziroj por plua sukceso en nia komuna poresperanta laboro.

Beograd, 18. I. 1965

POR LA ESTRARO
Politima Stankoviĉ
Olga Ĝukiĉ

RAPORTO

pri la agado de MEM-sekcio ĉe Esperanto-societo „Kulturo“ — Plovdiv
ekde la 17. IV ĝis la 31. XII. 1964

1. Estis efektivigita intima kaj konstanta kontakto inter MEM-sekcio kaj la Distrikta kaj Urba Pacdefendaj Komitatoj. Ivan Ŝivarov estas estrarano en la Distrikta, kaj Ivan Bataklijev — en la Urba Pacdefenda Komitato. Ili aktive partoprenas en la plenkunsidoj, utiligante Esperanton por agitado de la paco.

2. Estis pentrita (senpage de Danĉo Danĉev — pentristo) granda multkolora afiŝo „Per Esperanto al tutmonda paco“, kiu estis metita en la centro de la urbo.

3. Je la 28-a de oktobro en la Esperanto-Klubejo okazis prelego „Esperanto kaj la paco“. Prelegis Ivan Ŝivarov.

varov.

4. En decembro en vilaĝo Proslav la sama prelego estis ripetita.

5. En „Paco“ (bulgara eldono) aperis artikolo de Ivan Ŝivarov „Tiel ni agas por la paco“.

6. La korespondado kun eksterlandaj pacamikoj kaj komitatoj estis daŭrigita.

7. La ekspozicio „La homaj rajtoj“ (en Esperanto kaj en bulgara lingvoj) de UNESKO estis sukcese aranĝita en la urboj: Plovdiv, Karlovo, Pârvomaj kaj Ĥisar. Ĝi estas migranta en la distrikto.

8. Naŭmonata MEM-agado estis provo, kiun ni daŭrigos pli aktive.

Prezidanto: Ivan Ŝivarov

LA MALAPROBITA RAKONTO DE TOLSTOJ*

Foje Tolstoj konversaciis kun kelkaj junaj verkistoj el Moskvo. Dum la interparolado li malplezure konstatis, ke la komencantaj verkistoj evidente ne tre emas labori.

En la komenco la junaj verkistoj montris sindetenemon, ne dezirante paroli. Sed poste iu el ili ne eltenis kaj diris:

— Ni ne ĉesas skribi kaj ni verkas, estimata Tolstoj, sed niajn verkojn neniuj akceptas kaj neniuj presigas ilin.

Tolstoj estis ege mirigita.

— Sed kiamaniere rezultis tio? — demandis Tolstoj. — Vi ja estas talentaj homoj!

— Tio estas via opinio — respondis la junaj verkistoj — sed fakto estas, ke en la eldonejo la redaktoroj certe havas alian opinion.

Malgraŭ tio, Tolstoj konsideris tiun klarigon nekredebla kaj decidis li mem persone kontroli la aserton de la junaj literaturistoj. Li verkis mallongan rakonton kaj sendis ĝin al la redakcio de unu el la revuoj, subskribinte la rakonton per pseŭdonimo. Post du se-

majnoj Tolstoj direktis sin al la redakcio, por ekscii ion pri la sorto de sia rakonto. La redaktoro lin renkontis ne tre afable kaj rekte deklaris al li, ke lia verko ne estos presita.

— Kial do? — scivole demandis la verkisto.

Evidentiĝis, ke, laŭ la redaktoro, al la fama verkisto tute mankas ia ajn talento kaj, krom tio, li ne posedas bone la gramatikon. . .

— Mi devas konfesi al vi, afabla homo, — aldiris la redaktoro — ke, legante vian sensencaĵon, mi estis tute certa, ke verkis ĝin iu ankoraŭ nematuriginta junulo. Ne, pli bone estos, se vi ĉesus fuŝuzi la paperon. Krome, en via aĝo jam estas tro malfrue por komenci. Ĉu ĝis nun, antaŭ tiu ĉi rakonto, vi provis verki ion alian?

— Jes, mi verkis — modeste respondis Tolstoj. Mi skribis kelkajn verkojn, pri kiuj la tiama recenzo estis favora, ekzemple: „Milito kaj Paco“, „Anna Karenina“ . . .

Tradukis: Ivan DRAGANOV

EROJ — STRANGAJ KUTIMOJ

Betoven — neniam dum sia laboro razis sin kaj foje okazis, ke lia barbo estis duonmetra.

Balzak — parolante al si mem, ĉiam li demetis la ĉapelon.

Volter — ĉiutage trinkadis po 50 tasoj da kafo.

Petro la Granda — timis transiri la pontojn.

Bajron — neniam sidiĝis ĉe tablo, sur kiu estas salo.

Gjote — hermetike fermis sian ĉambron antaŭ ol komenci labori.

Djuma — verkis libron pri kuirarto.

Franklin — laborante ĉiam ĉe si havis panon kun fromaĝo por „kompletigi la mensan perdon“ laŭ li.

List — kuŝis dum unu jaro en lito post malsukcesa romanco, kun neniu parolante.

Brams — opiniis, ke dum purigado de ŝuoj alvenas plej bonaj muzikaj konceptoj.

* El la sovetia ĵurnalo „Izvestija“

ANTAŬ LASTA DRIVO

de Georgi Deŝkin

Al voĉ' de amo ĉiam mi obeis,
dum tuta viv' estinte ĝia sklav'.
Per miaj versoj, kiel bela pav'
per bunta vosto, ĉiam mi fieris.

Verkinte multe, ĉu mi ion kreis,
neniam laŭ ekstero kaj enhav'? —
N. nion. . .

Tamen de legantoj rav'
min akompanis, dum mi jubileis.

Aplaŭdoj, fotoj, notoj en gazetoj,
dediĉoj de aliaj gepoetoj
karegis min en fin' de longa viv'.

Sed pli ol ĉio — kredu! — via amo
karegas min. — Neatendita flamo
de ĝi min benas antaŭ lasta driv'!

MEDITO

de Nikola Uzunov

Ni, la homoj, konstruaĵojn faras,
kreskas la uzinoj ĉiun horon,
en la Kosmo vojojn ni trafaras,
sed ne scias vojon al la koro!

Jen kelkfoje ni tutkore amas,
jen fariĝas blindaj pro kolero,
jen en ni ĵaluzo vane flamas,
aŭ l' anim' pleniĝas je sufero!

Iufoje nin ekkaptas tristo,
iufoje sentas ni korpremon,
eĉ la koro de la optimisto
iufoje konas la ĉagrenon!

La angoro venas en la koro,
ĉar ne ĉio iras ĉiam flue! . . .
Sed se neniigus ni l' angoron
ĉu ne ĉiam vivos ni enue? . . .

Pensas mi: simila, kiel nia,
de l' estonta hom' la koro estos!
Do! En la estonto same tia —
kiel nia — la liriko restos!

LA ESPERANTISTO

de Toma Ajolov

Nun ni konatiĝos kun rimarkinda ulo,
kiun vi renkontus en ĉiu mondangulo.

Lin ornamas bruste kvinpinta verda stelo.
Ŝatus li la juston, sopiras nur pri belo.

Ĉar por monda paco li estas batalanto,
tial vervsenlace agitas Esperanton.

Kaj ĉar la lingvo helpa popolojn kunigas
por frateca vivo en feliĉ' kaj digno.

Abstinencul' li estas — vegetaran' iama,
en lia brusto nestas nur bono kaj homamo.

Al urboj kaj vilaĝoj, al landoj interesaj
ŝatas li veturi — vizitas mondkongresojn.

Li amikojn havas en ĉiu part' de l' mondo,
tion li atingis per multa korespondo.

La esperantisto scivolas mondproblemojn
iĝas komunisto, ĉar estas progresema.

En intencoj bonaj prosperu kaj persistu
tiu nobla homo, la hom' — Esperantisto!

JUNA ESPERANTISTO

ALVOKO PRI ALIĜO

de la Sofia Studenta Esperantista
Societo „Vela Peeva“

RILATE AL LA TUTLANDA JUNULARA KONKURADO — 1965

Karaj geamikoj,

Ni, la membroj de la Sofia Studenta Esperantista Societo „Vela Peeva“, pridiskutis la anoncitan Tutlandan Konkuron de BEJ — 1965 kaj decidis aliĝi entuziasme al ĝi. Ni kore gratulas niajn amikojn el Vraca kaj apelas al ĉiuj junularaj grupoj kaj studentaj societoj amase aliĝi al la Konkuro, kiu estas esenca ero de la Kampanjo grandskala „1965 — Jaro de la Bulgara Esperanto-Junularo“.

Krome, ni aldonas la jenajn indikojn pri la Konkuro:

1. Scienca, esplora, literatura kaj traduka aktiveco.
2. Kontribuo al „Juna Esperantisto“ — presorgano de BEJ.
3. Partopreno en tutlandaj konkursoj: oratoraj, belartaj k. s.
4. Partopreno en la kampanjo por

enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Kore ni deziras al ĉiuj sukcesan kaj rezultoplenan agadon en la Konkuro sub la inspiranta standardo de la Kampanjo „1965 — Jaro de la Bulgara Esperanto-Junularo“.

Sincere kaj amike via

SOFIA STUDENTA ESPERANTISTA
SOCIETO

SEKRETARIO:	PREZIDANTO:
Petr Todorov	Dimitr Jdrakov

La Estraro de BEJ konfirme akceptas la aldonitajn de SSES indikojn pri la Konkuro. Ni atendas la koncernan reeĥon pri la demando fare de la ceteraj junularaj grupoj kaj studentaj societoj. Kial ili ankoraŭ silentas? ...

JUNA ESPERANTISTO — KIA ĜI ESTU?

Karaj geesperantistoj,

Dum la pridiskuto de la redaktado kaj aperado de „Bulgara Esperantisto“ bonvolu ankaŭ konkrete havigi al ni viajn opiniojn kaj rekomendojn pri la samaj demandoj rilate la junularan or-

ganon „J. E.“!

Ĉiuj junularaj grupoj (S. S.) nepre plenumu tion, adresante sin al: P. K. 587, Sofio — BEJ. Ni atendas viajn leterojn! Antaŭdankojn!

La Estraro de BEJ

PETO AL LA KURSGVIDANTOJ KAJ AL LA KOMENCANTOJ

Lastatempe mi estas superŝutata de petoj por korespondi. El la leteroj mi komprenas, ke oni prenas mian adreson el „Bulgara Esperantisto“, kies peranto mi estas por Nederlando. Ŝajnas, ke oni supozas, ke la adresoj de la perantoj estas korespondanconco. La plejmulto el la korespondemuloj estas komencantoj, kiuj jam post la unuaj lecionoj deziras korespondi. Laŭ mia modesta opinio estus preferinde, ke oni unue pli bone sciu la lingvon, antaŭ ol oni ekkorespondu, sed krome mi tre dezirus, ke la kursgvidantoj atentigu al la kursanoj, ke la adresoj de la perantoj ne valoras kiel korespondanconcoj.

Ru Bosong

La Estraro de Bulgara E-Junularo

DISTRIBUO

de la taskoj kaj postenoj en la Estraro
de BEJ

Korespondadreso: Sofia, p. k. 587, Bulgario

I. Sekretariato

1. Prezidanto:

Emil Keremidčiev

resp. pri: Kunlaborado kun NEO

Lerneja Fakoj

Koresponda Servo kaj Enlan-

da Koresponda Reto de „Juna

Esperantisto“.

2. Vicprezidanto:

Delka Ĉolakova

resp. pri: Studentaro en Ŝtata Univer-

sitato

Praktika plenumado de kon-

kretoj taskoj.

3. Sekretario:

Dimitr Ĵdrakov

gvidas la fakojn: Organiza kaj Ekster-

landa

Redaktoro de „Juna

Esperantisto“ — pre-

sorgano de BEJ

resp. pri: Informa Fakoj

Kunsidoj de la Sekretariato

4. Membro:

Petr Todorov

gvidas la fakojn: Informa kaj Bulgara

Esperantista

Studentaro

resp. pri: Laborista Esperanto-Junularo

Konkretoj komisiitaj taskoj.

II. Estraro de BEJ ekster Sofio:

1. Nikola Pilev, HASKOVO, str. Ĵitnica 3-a

gvidas la fakojn: Laborista Espe-

ranto-Junularo

resp. pri la agado en la distrik-

toj: Stara Zagora, Ĥaskovo, Kâr-

ĝali.

2. Jordan Angelov, v. ĈEŜNIGIROVO, di-

strikto de Plovdiv

gvidas la fakojn: Vilaĝana Es-

peranto-Junularo

resp. pri la agado en la distriktoj:

Pazarĝik, Plovdiv, Smoljan.

3. Georgi Deev, TÂRNOVO

gvidas: Lernejan Fakojn

resp. pri la agado en la distriktoj:

Loveĉ, Gabrovo, Târnovo, Târgo-

viŝte.

4. Georgi Dimitrov, RUSE, str. Komso-

molska 8

gvidas la fakojn: Koresponda

Servo

resp. pri la agado en la jenaj

distriktoj: Ruse, Razgrad, Sili-

stra, Kolarovgrad

kaj Bulgara Esperantista

Studentaro

5. Strahil Dimitrov, VRACA, Teksa Tek-

nikumo

resp. pri Lerneja Fakoj

la agado en la distrik-

toj: Vidin, Miĥajlov-

grad, Vraca, Plevne.

6. Dimitr Ĥristov, JAMBOL, str. Plaĉko-

vica 1.

resp. pri Lerneja Fakoj

la agado en la distrik-

toj: Sliven, Jambol,

Burgas

Provizoro:

Angel Kerkin, VARNA, p. k. 11

resp. pri la distriktoj: Tolbuĥin,

Varna

Liljana Mireva, KJUSTENDIL, str. Lev-

ski 8

resp. pri la distriktoj: Kjusten-

dil, Pernik, Blagoevgrad

Veliĉko Donĉev, SOFIA, str. VI. Pop-

tomov 52/II

resp. pri la distrikto: Sofia

SCIIGOJ DE LA REDAKTA KOMITATO

1. Por helpi la laboron en la Kan-
celario de BEA kaj plifaciligi la re-
daktadon de „Juna Esperantisto“, bon-
volu estonte ĉiujn materialojn kaj de-
mandojn pri junularaj temoj adresi
rekte al: Sofia, P. K. 587, BEJ —
„Juna Esperantisto“, Dimitr Ĵdrakov.

2. Evidentiĝis jam delonge, ke pub-

likigo de artikoloj kun troa malfruigo
estas tute seninteresa kaj nevalora.
Do, ni kore petas, ke ĉiuj artikoloj
atingu nin plej malfrue 3 semajnojn
post okazigo de la tuŝitaj eventoj
(demandoj). Pli malfrue ol unu monato
post ties aktualeco ili ne estos pre-
sataj.

Internacia Junularkonferenco pri „Komunikado“ — 25. VII. — 31. VII 1965, Amsterdam

La Internacia Junularcentro de la Anne Frank-Fondaĵo ĉiujare organizas konferencojn por gejunuloj, ĝis nun nur en angla lingvo. Por unua fojo ĉi-jare Esperanto estos allasita kiel konferenclingvo. Per tiu ĉi Konferenco, kiel labortemo estos „Komunikado“ (pli precize: „Homa interkompreniĝo“), la Fondaĵo kontribuos sian eron al

la Jaro de la Internacia Kunlaborado. La provizora programo krom 5 prelegojn kaj diskutojn, antaŭvidas ekskurson, danc- kaj artvesperojn, tradicion interkonan kaj adiaŭan vesperojn k. a.

Kotizoj: ĝis 1. IV. 1965 — f. 95
ĝis 1. VII. 1965 — f. 100

Limdato por aliĝo: 30. VII. 1965

Adreso: Anne Frank-Domo, Prinsengracht 236, Amsterdam — C, Nederlando.

„Juna Esperantisto“ — n-ro 4, 1965

RICEVITAJ

1. „Kontakto“ — n-roj 3, 4, 5.
2. „Studento“ — „ 1, 2, 3, 4.
3. „Universo“ — „ 1.
4. „Bulteno de SEK-Zagreb“ — ĉiuj numeroj.
5. „Kompreneble“ — n-roj 1, 2, 3.
6. „La Suda Stelo“ — „ 1, 2, 3.
7. „Homo kaj Kosmo“ — „ 2.
8. „Ripozoj“ — ĉiuj numeroj.
9. „Germana Esperanto-revuo“ — ĉiuj numeroj.
10. „L'Esperanto“ — n-ro 89.
11. „Tamen“ — ĉiuj numeroj.

12. „HEJS-Bulteno“ — „ 37, 38, 39.

13. „Junulara Kuriero“ „ 5, 6, 7.

14. „JEN—Bulteno“ — ĉiuj numeroj.

15. „Paco“ — ĉiuj numeroj.

16. „Bulgario“ — ĉiuj numeroj.

* * *

Al ĉiuj sendintoj — korajn dankojn!

BEJ kore petas ĉiujn redakciojn de junularaj E-organoj aŭ eldonoj kun junularaj paĝoj sendadi regule siajn numerojn al nia adreso: SOFIA, P. K. 587 — Bulgara Esperanto-Junularo! Ni akurate recipokos per nia organo „Juna Esperantisto“ (enkadre de „Bulg. Esperantisto“).

La Estraro de BEJ

СВЕТОВНИЯТ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ КАНДИДАТ ЗА НОБЕЛОВАТА НАГРАДА ЗА МИР

Световният есперантски съюз е предложен като кандидат за Нобеловата награда за мир за 1965 г. От получените сведения се вижда, че от 18 страни 253 лица, които според устава за Нобеловата награда за мир имат право да предложат кандидати на Нобеловия комитет при Норвежкия парламент в Осло, са предложили СЕС като кандидат за тази награда.

Предложителите от България са: акад. Тодор Павлов; акад. Георги Наджаков; акад. Георги Караславов; Сава Дълбоков, народен представител; проф. Александър Бурмов; проф. д-р Минко Русенов; проф. Петър Мاستиков; Васил Чочов, ВИИ „Карл Маркс“; Петър Колев, народен представител.

Мнозина световно известни деятели в областта на политиката, философията, правото, изкуството, науката са подчертали значението на международния език за сближаването и разбирателството между народите и дейността на СЕС за укрепване на мира в света.

ТОВА НИ ВДЪХНОВЯВА

По почин на др. Еньо Даскалов, председател на младежката есперантска група в гр. Враца, се започна преподаването на уроци по есперанто от самите ученици. В ръководените от него 7 курса се избират най-добрите ученици, които подготвят следващата лекция и я преподават на своите другари. Това вдъхновява всеки, който ще преподава урок, да се подготви по-добре както от фактическа, така и от педагогическа страна. Първи започнаха да преподават уроци учениците от курса за напреднали, а след това и тези за учителска правоспособност, като Ангел Петров, Веселин Белорешки, Живко Иванов и др. Много добри уроци преподадоха и учениците Тодор Иванов, Стойчо Методиев, Ни-

колай Беновски, Маргарита Любенова, Лилияна Йолова и др., които започнаха да изучават есперанто от началото на тази учебна година. След всеки урок Даскалов обобщава преподадения материал, посочва грешките, обсъжда се методът на преподаване. В обсъждането на урока участвува целият курс. Уроците се посещават и от по-възрастни есперантисти — гости.

Този метод активизира учениците и те още по-упорито изучават езика. Всеки, който покаже, че добре владее преподадения материал, получава правото да предаде урок. Всеки се стреми да получи това право, за да преподава знанията си на своите другари.

Д. Сертов

La Estraro de Bulgara Esperanto-Junularo ege dankas kaj gratulas la Junularan Grupon „Hristo Botev“ en Vraca kaj SSES „Vela Peeva“ pro la ĝisnuna modela akurata kaj abunda korespondado kun nia Sekretariato kaj informado pri la vivo kaj agado enloka!

Novajn kaj pli grandajn sukcesojn, karaj geamikoj!

JDR

* * *

Estraranoj de BEJ kaj lokaj akti-

NIAJ KUNLABORANTOJ

Responde al nia Alvoko pri kunlaborado al „Juna Esperantisto“ — presorgano de Bulgara Esperanto-Junularo, la redaktoro ĝoje sciigas, ke jam estas akceptitaj kiel konstantaj korespondantoj al la organo el eksterlando la jenaj gejunuloj:

1. F-ino Anna Lukaszewska, Radzivilow Mazowiecki, pow. Skierniewice, woj. Lodz, Pollando.

vuloj,

Bonvolu senprokraste kaj akurate plenigi kaj resendi al P. K. 587, Sofia, BEJ, la jam dissenditan statistikan informilon de la grupo (societo)! Ĝi estas grava helpilo por nia Sekretariato en la estonta laboro kaj eksterlanda informado!

Kolektu amase subskribojn sub la peticio al UNO! Nia juna membraro kolektu entute minimume 50,000 subskribojn! Nia kontribuo al la Jaro de Internacia Kunlaborado estu digne konsiderinda kaj valora!

2. S-ro Bernd Weber, Ostrato 55 Leipzig 05, GDR.

3. F-ino Anna Salomon, Arpad fej. u. 27, Budapest II, Hungario.

4. K-do Danielo Kolker, Ĵeleznodoroĵnaja 4, kv. 9, Zaporozĵje 2, Ukrainio, USSR.


Sukcesan kaj plenefikan kunlaboradon, karaj geamikoj!

Д. Јдрakov

JEN ESTAS VERA ESPERANTUJO

(daŭrigo de n-ro 12/1964)

Post la romantika urbo Kecskemet, per la trajno mi forveturis al la „Perlo de Danubo“ — la dumiliona ĉefurbo Budapeŝto. Jen kiel koncize ĝi estis prezentita al mi: „Riĉa historio, vigla moderna vivo, belega situo ĉe la bordoj de „Blanka Danubo“, gracilaj pontoj kaj luksaj konstruaĵoj, antikvaj monumentoj, kulturo, arto, gastamo kaj viv-
ĝojo — ĉion vi trovos en Budapeŝto!“




La Monumento de Lajoŝ
Koŝut en Keĉkemet

Kaj vere — ĉarmaj, unikaj kaj eminentaj hungaraj indaĵoj varie pliagrabligas la restadon de eksterlandano. La vortoj de Dr. Bácskai István pruvigas sen daŭra observo. Pli ol 200 mineralaj akvofontoj malavare pliriĉigas la naturajn lokajn trezorojn kaj efike kuracas. La estetikaj ĝuosentoj dum vizito de la „Arta Galerio“, „Gelert“-supraĵo, Fiŝkaptista Bastiono, „Margit“ — insulo, la Parlamento k. a.

estas profunde agrablaj kaj siaspece unikaj. Ŝajne ĉio estas nuancita per antikva belaspekta romantiko kaj nuntempe pulsanta dinamiko. . .

Dumvespera Danubo kaj plena je muziko kaj beleco vidaĵo al la tuta urbo — malfacile priskribebla travivaĵo de sur „Gelert“ — supro. Kulturo kaj deca sinteno, moroj kaj gastameco je digne evoluanta aspekto parolas multon pri Budapeŝto, pri la hungara popolo.


La Esperanto-movado lastatempe „kontentige“ plivastiĝas. Ne hazarde la 51-a UK de Esperanto okazos en 1966 en Budapeŝto. Unuafoje mi spertis kortuŝan esperantistan atmosferon inter la lokaj fervojistoj, en kies kancelario mi ren-



La kastelo de Vajda Huniad en
Budapeŝto

kontiĝis kun treege afablaj geaktivuloj, kiel D-ro Bácskai István, s-ro Jurányi János, inĝ. Ciboj k. a. Trinkante bongustan kafon ni interparolis pri diversaj demandoj kaj mi restis agrable surprizita, kiam eksciis ke preskaŭ ĉiuj estas vizitintaj Bulgarion. Ili rakontis belajn impresojn pri nia lando kaj ĝiaj nuntempaj valoroj kaj popolo. Por ili nia ĉefurbo, Plovdiv, Târnovo, Kazanlâk, Varna kaj la Nigra Marbordo, la Rila Monaĥejo k. a. estas lokoj, memorataj kiel nepre vizitindaj belajoj.

La vesperon mi ĉeestis en la Fervoja Klubejo, kies riĉa programo parolis pri agemaj entuziasmuloj. En la bonege aranĝita klubejo kun alloga biblioteko kunvenis pri ol 150 geesperantistoj. Ĉefa temo: „La Tragedio de l' Homo“ — elstara verko de Madách Imre, majstre tradukita de Kalocsay. Je la fino — arta programo kaj salutoj de la gastoj. Dum la liberaj konversacioj mi parolis kun multaj gejunuloj pri nia kaj de HEJ Esperanto-aktivado, pri la belecoj de „sunriĉa kaj gastama lando de la rozoj — Bulgario“, pri aliaj junularaj temoj. Interese — ĉie la junularo estas unu kaj



Nova ponto en Budapeŝto

sama progresema aro da optimismaj kaj brilantaj je bonaj estontaj planoj gejunuloj. Dancmuziko kaj po iom da „reĝa vino — Tokaji“ estis agrabla fino de la sencplena vespero.

En la kancelario de HEA



Nacia Artgalerio en Budapeŝto

— K-do Ĉesko, ĉu vi estus afablaj diri pri la 51-a UK de UEA?

— Niaj deziroj kaj volo por sukcesigo de la Kongreso estas tre grandaj! Ni atendas multnombrian partoprenantaron, sed tio nin ne timigas.



Monumento de la pereintaj studentoj por libero en Budapeŝto

— Ĉu la ekzemplo de la 48-a Kongreso en Sofio havas ian utilon por vi?

— Jes, certe! Post la laŭdinda okazo de la 48-a ni kuraĝis proponi al UEA gastigi Universalan Kongreson en Budapeŝto. Ni sekvas vian ekzemplon tiurilate.

— Kaj pri la agado de HEJ?

— Ni ĉiam subtenas kaj impulsas ĝian elkreskon. Certe ĉiuj gejunuloj montros ĝojigajn atingojn. Ilin atendas la 22-a TEJO-Kongreso!



Balaton-lago

— Mi kore dankas! K-do Kapitani, ĉu vi ankaŭ volonte diros kelke da vortoj pri la junularo?

— Plezure? Post la UK en Budapeŝto okazos la Junulara en Vespri. Provizore ni planis ekskursojn al Szeged, Miskolc kaj Balaton-lago. La jam montrita granda intereso al ambaŭ aranĝoj devos trovi ĉe ni bonan or-

ganizadon kaj interesan programon eksterkongresan.

— Io nova ĝenerale el via movado?

— Baldaŭ aperos nova lernolibro de Esperanto, Hungara-esperanta poŝa konversacilibro kaj Foto-albumo pri Hungario (kolora) — valoraj kontribuoj por plua penetro de la lingvo inter la vasta neesperantistaro. . .

La Hungara Esperanto-Junularo

Antaŭ nelonge fondita sekcio de TEJO, jam rapide plifortiĝas. Kun multnombra membraro, kies relative vigla agado inspiras bonajn esperojn, HEJ baldaŭ aspektos certe kiel matura kaj stabila junulara sekcio de TEJO. Jen kion rakontis k-do Ciboj, sekretario de HEJ, pri la loko de la 22-a Junulara Kongreso de TEJO:

— Vespri estas malnova historia kaj moderna universitata urbo pitoreske situanta ĉe la montaro Bakony, proksime de Balaton.

Dimitr Jdrakov

POR LA ŜATANTOJ DE LA LIBRO

Pere de Bulgara Esperantista Kooperativo, bulv. Vitoŝa 40, vi povas aĉeti kaj ĝui belegan esperantan legaĵon laŭ jena katalogo:

1. SUB LA JUGO — romano de Ivan Vazov 1.73 lv.
2. BOFILINO — romano de Georgi Karaslavov 1.33 lv.
3. ELEKTITAJ VERSAĴOJ — de Nikola Vapcarov 0.67 lv.
4. VAGABONDOJ (Nemili nedragi) — de Ivan Vazov 0.52 lv.

5. LA FARAONO — en 3 volumoj de B. Prus 8.00 lv.

6. VIRINO ĈE LA LANDLIMO — de M. Boulton 2.80 lv.
DIALOGARO de P. Colov 1 lv.

Kaj multaj aliaj aĉetindaj verkoj estas troveblaj en la Bulgara Esperantista Kooperativo.

Serĉu la librojn vendatajn de BEK kaj fariĝu ĝia membro!

La estraro de BEJ

IV Somera Esperanto-Universitato en urbo Gyula, Hungario, okazos de la 4-a ĝis la 9-a de julio ĉ. j. En ĝi prelegos elstaraj hungaraj kaj eksterlandaj esperantistoj, inter kiuj ankaŭ la prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio k-do N. Aleksiev.

RUSE. La 5-an de februaro j. k. la urba Komitato de 5 lokaj E-societoj aranĝis komunan vespermanĝon en la plej granda unuaranga restoracio „Prista“. Pli ol 100 geesperantistoj okupis siajn lokojn ĉe la tabloj. En gaja intima atmosfero komenciĝis la modesta vespermanĝo, kiu tamen montris al la ĉeestantaj geurbanoj, kion prezentas en nuna momento la Esperantomovado en nia urbo. La prezidanto de la urba societo „Libero“ k-do Stojan Cvetkov dankis al la ĉeestantaj esperantistoj pro ilia amasa partopreno kaj invitis ilin ĉiam labori entuziasme por atingi novajn sukcesojn. Post tio k-do Stojkov, en bulgara lingvo, turnis sin al la ĉeestantaj geurbanoj: „Estimataj gekamaradoj, certe sen traduko vi komprenis, ke nia prezidanto parolis pri la internacia helplingvo Esperanto kaj ĝiaj sukcesoj. Ĉu estas iu el vi, kiu ankoraŭ ne aŭdis ion pri Esperanto?“ Multaj geurbanoj respondis: „Ni scias, ni scias, vivu Esperanto!“ kaj aplaŭdis.

La plej juna esperantisto 6-jara Enĉo Kirilov deklamis en Esperanto kaj bulgara lingvoj.

En la restoracio vespermanĝis ankaŭ kun kelkaj aliaj personoj la ĉefo de la kleriga fako ĉe la distrikta konsilantaro k-do Samanĝiev. Li multfoje helpis en diversaj okazoj la reprezentantojn de la movado en nia urbo. La esperantistoj decidis aĉeti florbukedon kaj la prezidanto de la junulara sekcio k-do Dobrev kaj k-dino Preslavska surprizis lin per la modesta donaco kaj esprimis la dankemon de ĉiuj geesperantistoj en Ruse.

Sekvis dancoj kaj amuzoj ĝis la noktomezo kaj ĉiuj disiris kontentaj.

La sekretariino de la urba societo „Libero“ k-dino Preslavska, membro de CK de BEA, jam duan jaron gvidas en la Pionira Domo kurson por junpioniroj. Ŝi havas bonajn sukcesojn kaj la artensemblo de la pioniroj per kantoj, deklamaĵoj, muzikaĵoj sin prezentas dum la diversaj festoj (ekz. la 16-an de decembro p. j. dum Zamenhofa tago). Tiamaniere la kursgvidantino instruas la junpionirojn por ke ili fariĝu spertaj esperantistoj, niaj aktivaj anstataŭantoj.

Boris Kavalĝiev

BLAGOEVGRAD. Ekde la 1-a de decembro p. j. estis malfermita E-kurso en la Mekanika Teknikumo. Ĝi okazas ĉiumerkrede je la 19-a horo. La kurson partoprenas 26 kursanoj, kiuj lernas la internacian lingvon entuziasme.

K. Cvetkov

ĤARVOMAJ. En la urbo funkcias 4 E-kursoj:

1) ĉe la gimnazio — por lernantoj el XI „a“

klaso kun gvidanto k-do Samuil Panajotov klasestro de la sama klaso;

2) ĉe la gimnazio — por la lernantoj el VIII klaso kun gvidantino k-dino Dobrinka Ljanguzova, klasestrino de VIII „v“ klaso;

3) ĉe la societo — por civitanoj gejunuloj;

4) ĉe la societo — por grupeto da lernantoj el VII klaso.

Plej bone funkcias la E-kursoj en la gimnazio dank' al la fakto, ke la samaj klasestroj, samtempe E-kursgvidantoj de tiuj ĉi klasoj, tre bone direktas la atenton kaj la obstinon de ĉiuj gekursanoj en la sukcesa lernado de la Internacia Lingvo.

La kursgvidantoj perfektigas en la distrikta E-kurso por instruistoj en Plovdiv ĉe E-societo „Kulturo“.

Ni varbis la direktoron de la gimnazio, kiu jam komencis lerni Esperanton aŭtodidakte.

Dinko Ŝiŝkov

V. ŜIPKA, EN LA DISTRIKTO DE STARA ZAGORA. La E-societo en la vilaĝo agas bone. Dum la jarkunveno, kiu okazis je la 25-a de februaro 1965, oni aprobis la planon, kiu antaŭvidas diversajn kaj interesajn entreprenojn. Iuj el tiuj ĉi aranĝoj estas: kelkaj labortagoj dum la somero (kaj de la ricevitaj sumoj oni sendos 1/3 por E-domo en Sofio, 1/3 por montodomo sur Vitoŝa-monto, 1/3 por la societa kaso), ĉiu esperantisto estu modela oficisto kaj klopodu atingi la honoran titolon „Plej bona en sia profesio“, ĉiu samideano helpu al la Kamparmastruma Kooperativo, ekskursoj k. a.

Cvjatko Dimitrov

AJTOS. En 1923 estis fondita E-societo sub la nomo „Ondo“. En la unuaj jaroj la societo disvolvis bonan agadon. Dum la faŝista reĝimo la membroj de la societo estis persekutataj, kaj la societo vegetis.

Dum la jaroj de la popola regado ĝi renovigis sian ekzistadon, sed la agado ne estis laŭdinda.

En la komenco de tiu ĉi jaro dank' al la klopodoj kaj entuziasmo de kelkaj kamaradoj la societo komencis bonan agadon. Dezirantoj lerni la lingvon estis multaj. Oni elektis novan estraron. Nun la kurso por la lernado de Esperanto funkcias bone. Gvidanto estas k-do Georgi Lazarov. En la kurso partoprenas 30 gekamaradoj inter kiuj 15 lernantinoj el la loka politeknika gimnazio.

Ĝojiga estas la fakto, ke la junuloj kun granda intereso kaj deziro komencis lerni la Internacian Lingvon.

K. Paspalov

ĤASKOVO. La 17-an de februaro la esperantistoj en la urbo okazigis solenan vesperon konekse kun la naskiĝtago de la patrono de la societo „Asen Zlatarov“. La solenaĵon malfermis per malgranda muzikprogramo la lernantoj de unu klaso de elementa lernejo, ĉiuj lernantaj Esperanton. La etaj esperantistoj kantis kaj deklamis esperantajn kantojn kaj versaĵojn.

Pri la vivo kaj la socia agado de profesoro Asen Zlatarov parolis la sekretario de la societo k-do Boris Kolev. Li rakontis pri la energia kaj entute dediĉita al la klerigo de la popolo vivo de nia granda sciencisto.

Poste en solena atmosfero estis disdonitaj la atestoj de esperantistoj, ĵus finintaj la tri kursojn de Esperanto por komencantoj. La prezidanto de la societo Georgi Idakiev salutis la novajn esperantistojn kaj invitis ilin eniri la vicojn de la societo kaj dediĉi siajn freŝajn fortojn kaj energion al nia movado. Multaj el ili ekdeziris kaj estis akceptitaj kiel membroj de la societo.

Nikola Uzunov, Sofio

KUBRAT. La 27-an de februaro E-societo „Progreso“ organizis sian tradicion amuzvesperon. En la bele ornamitan ĉambregon de restoracio „Moskvo“ venis pli ol 180 geurbanoj. Venis ankaŭ esperantistaj grupoj el Ruse, Razgrad, v. Zavet, v. Gloĝevo. La solenaĵo estis malfermita de k-do St. Nenov, prezidanto de la societo, poste sekvis arta programo plenumita de E-klaso ĉe la loka gimnazio. Junaj knabinoj ornamis ĉiun gaston per verda steleto kun speciala fadeneto okaze de la 1-a de marto. Estis ricevitaj gratulaj leteroj el Svedio (Karl Kvist, kiu estis en Kubrat kaj estas bone konata inter la loĝantaro), el Francio, Belgio, Hungario, Aŭstrio kaj aliaj, kiujn tralegis la sekretario Iv. Alahverĝiev. La ĉeestantoj tondre aplaudis ĉiun gratulanton. Maria Preslavska salutis la solenaĵon je la nomo de E-grupo el Ruse kun bondeziroj por pli oftaj renkontiĝoj inter najbaraj societoj. Okazis interesa loterio kaj estis disdonitaj donacoj al la gajnintoj. Junulara orkestro ludis ĝis malfrua nokto kaj ĉiuj dancis, amuziĝis kaj disiĝis tre kontentaj kun bondeziroj por novaj kaj oftaj renkontiĝoj. Per tio ĉi E-societo gajnis novajn adeptojn.

Ĥr. Dimitrov

SMOLJAN. La Esperantista societo „Kulturo“ malfermis tri kursojn. La unua kurso funkcias en la Legejo „Hristo Botev“. Ĝin partoprenas 16 civitanoj. La dua — en kv. Rajkovo — por la oficistoj kaj la laboristoj de la Ŝtata Tabakindustria Entreprenejo. Ĝi estas vizitata de 14 gekursanoj. Kaj la tria — en la Pedagogia Instituto por Geinstruistoj. 40 ge-

studentoj partoprenas la lastan, kiu estas malfermita fare de la Komsomolo en la sama Instituto. Eble ni baldaŭ fondos junularan sektion ĉe nia E-societo.

P. Pamporov

VRACA. La junulara esperantista grupo en la urbo organizis recitadon de esperantaj kaj tradukitaj en Esperanton versaĵoj je la 21-a de februaro ĉ. j. en la salono de la Kulturdomo.

La salono estis plenplena. La veterano de la Esperanto-movado k-do Dimitr Sertov recitis kun granda entuziasmo la versaĵojn: „La vojo“, „La Espero“, „Septembro“, „Ĥaĝi Dimitro“ k. a.

La ĉeestantoj restis tre kontentaj. Poste ĉiuj dancis.

Enjo Daskalov

50 ESPERANTLINGVAJ PRELEGOJ DUM 1964

Ĉu vi dubas? Ho, ne! Foliumu la oficialajn informilojn No. No. 16, 17, 18 kaj 19 de E-societo „Kulturo“, Plovdiv, kaj vi certigos. Tio ja estas koliero el belegaj kaj interesaj temoj. Kiu ne dezirus aŭdi pri la eminentuloj Aleksandro Djuma-filo, Viktor Jugo, Taras Ŝevĉenko, Maksim Corkij, Gogol, Lermontov, Ivan Vazov, Karl Marks k. a.? Serioze traktita estis ankaŭ la „Historio de Esperanto“. Inter la skribdokumentoj, la aŭskultantoj havis la maloftan okazon aŭdi samtempulon — personan konatulon de D-ro L. L. Zamenhof. Tiu feliĉulo estas nia estimata samideano Penko Stoev, kiu rakontis interesajn epizodojn el la esperanta vivo antaŭ duonjarcento (54 jaroj).

En la rubriko „Lingvaj demandoj“ ĉiuj aŭskultantoj konatiĝis kun la karakteraj malofte uzataj gramatikaj, stilaj, leksikaj k. a. reguloj kaj ekzemploj. Tre interesaj estis la prelegoj (vojaĝpriskiboj) pri Francio, Usono, Maroko, Jugoslavio k. a. landoj. Krom tio okazis prelegoj pri paco, ekonomio, politiko k. a. Inter la prelegintoj estas: Pejĉo Pejĉev (docento), J. Kovaĉev (verkisto), VI. Rangelov (arkitekto), Iv. Ŝivarov (ĵurnalisto), At. Ŝopov (lingvisto), Iv. Bataklijev (socia aktivulo), L. Soti-

rova kaj P. Petrov (instruistoj), Nik. Vasilkov (E. aktivulo) k. a.

La tradiciaj ĉiumardaj vesperoj, organizitaj de E-societo „Kulturo“ en Plovdiv, estas stabiligitaj. La variaj interesaj kaj riĉenhavaj temoj (esperantlingve) allogas pli kaj pli la aŭskultantojn. La utileco de niaj esperantlingvaj prelegoj estas triflankaj, nome: 1. Ni kutimigas la esperantistojn al praktika Esperanto-parolado (post ĉiu prelego okazas diskutoj). 2. Ni bone propagandas Esperanton. Ju pli da esperantlingvaj prelegoj, des pli da sukcesoj.

Ivan Šivarov,
Plovdiv

NOVA STELO SUR LA VERDA FIRMAMENTO

En la raporto de CK de BEA antaŭ la 36-a Kongreso en Pleven oni kritikis la estraron de societo „ALBATRO“ en Varna, ke en ĝia distrikto ne estas Esperanto-societoj. La kritiko estis prava, ĉar estas intereso al Esperanto ne nur inter la varnanoj, sed ankaŭ inter la loĝantaro de la distrikto. Ni ofte ricevas kortuŝajn leterojn el vilaĝoj kaj urbetoj kun petoj pri helpo: el vilaĝo Mlada Gvardia skribis al ni gejunuloj, el vilaĝo Reka Devnja skribis kaj eĉ per la telefono petis nin gelaboristoj kaj geoficistoj, laborantaj en la Kemiaj Uzinoj „Karl Marks“, el la proksimaj urbetoj Balĉik, Provadia k. a.

Ĉi-jare ni decidis helpi la dezirantojn, kiuj volas lerni la lingvon. La agema malnova esperantisto k-do Venko Rusev, vicdirektoro de la Kemiaj Uzinoj „Karl Marks“ en vilaĝo Reka Devnja, sukcesis organizi kurson por komencantoj. En la kurso partoprenas proksimume 25 personoj, la plimulto junaj homoj-gelaboristoj, geoficistoj, inĝenieroj k. a. La kurson gvidas nur unufoje semajne docento Georgi Dimov laŭ la rekta metodo de Andreo Cseh.

Ĉiun ĵaŭdon posttagmeze la uzina aŭtonuligas la distancon el 33 km de Varna ĝis la kursejo en R. Devnja. Regas entuziasmo. La novaj gekursanoj jam revas pri esperantaj renkontigoj. Iuj el ili partoprenos la Festivalon en Dimitrovgrad, aliaj revas pri la venontjara Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto, kelkaj jam komencis korespondi... Nun multaj gelaboristoj esprimis sian bedaŭron, ke ne sukcesis enskribiĝi kaj partopreni la kurson. Ili deklaris sian deziron tion fari dum la venonta aŭtuno-vintro.

La 18-an de februaro 1965 ni ne havis lecionon, aŭ pli ĝuste ni ne havis „konversacion“, ĉar tiam kolektiĝis la novaj entuziasmuloj por fondi novan Esperanto-societon. Ĝia nomo estas „Karl Marks“. Estis elektita estraro: prezidanto — k-do Venko Rusev, sekretario — k-dino Nedjalka Popova, kasisisto — k-dino Stanka Niĉeva, kulturklerigaj aferoj — k-do Stefan Nenkov kaj bibliotekisto — k-dino Koharis Arŝak Zeronova. En la kontrola komitato estis elektitaj: k-dino Ĵivka Petrova — prezidanto kaj k-do Nikola Mitev kaj Aleksandr Kirilov — membroj. La nova societo havas 37 regulajn membrojn. Je la nomo de CK de BEA kaj societo „Albatro“ gratulojn kaj bondezirojn direktis la subskribinto.

Nova verda stelo forte ekbrilis sur la vasta esperanta firmamento!

Docento Georgi Dimov
Prezidanto de E-societo „Albatro“, Varna

TURISTA KRONIKO

La Sekretariato de Turista Asocio „La Naturamikoj“ subskribis la Proponon al UNO pri Esperanto. Per tio ankoraŭ unufoje la gvidantoj de tiu ĉi grava internacia turista organizaĵo, havanta 283,164 membrojn, montris sian simpatian al nia lingvo. Ĝi kontribuas al niaj penoj por amasa apli-

kado de Esperanto ĉe la internaciaj turistaj kontaktoj.

La okcidentgermana organizo de la Turista Asocio „La Naturamikoj“ eldonis bele fabrikitan, relative ampleksan (56 p., formato 15×20 cm) enhaviĉan broŝuron „Die Weltsprache Esperanto“. Ĝi donas tre klaran bildon en 8 ĉapitroj pri la Internacia Lingvo, ĝia aŭtoro, la movado kaj ankaŭ pri ĝia esenca gramatiko.

La Esperantista familio Tinka kaj Atanas Lakov el Sofio malavare subtenas la montodomon per mono kaj objektoj. Nun ili disponigis al la montodomo kuirejan fornon kaj akvovar-migilon. Pro la malavara subteno de la montodomo ankaŭ k-dino Tinka Lakova, kiel pli frue k-do A. Lakov, estis nomita kunfondinto de Montodomo „Esperanto“.

GRAVA!

Ni serĉas pensiulojn por konstanta aŭ perioda dommastrado de Montodomo „Esperanto“, sur Vitoŝa-monto.

Estas preferataj esperantistoj. Pli detalajn informojn oni povas ricevi de la estraro de Turista Sekcio „Esperanto“, p. k. 66, Sofio.

La estraro

— La 8-an de februaro k. j. okazis jarkunveno de Turista Sekcio „Esperanto“. Post vigla pridiskuto de la intensa sekcia agado oni aprobis la

ĉefajn taskojn, kiujn oni devas plenumi en la kuranta jaro: finkonstruo kaj meblado de la montodomo, plantado de arboj kaj arbustoj ĉirkaŭ ĝi, okazigo de ferio-semajno dum la vintro kaj la tradicia jam montodoma festo la 7-an kaj la 8-an de aŭgusto.

Jen la nova sekcia estraro: N. Nikolov — prezidanto, L. Mladenov — vicprezidanto, J. Ĉaljevski — sekretario, G. Petrov — kasisto, I. Nikolov — dommastro kaj B. Veliĉkov, E. Cifudov, V. Nikolova, V. Donĉev — membvoj.

— Rudolf Burmeister el GDR vizitis la montodomon kaj donacis belan mur-tapiŝeton.

S-ino Tunstall—Dunn en Sofio



En februaro 1965 en Sofio gastis s-ino Irene Tunstall-Dunn el Anglio kun sia edzo s-ro T. C. Dunn. Ili renkontiĝis kaj interparolis kun s-noj At. Lakov, Iv. Sarafov kaj G. Jotov, kiel reprezentantoj de Bulgara Esperantista Asocio

Okcidenta Regiono de Pola Esperanto-Asocio aranĝas de 2-a ĝis 15-a de oktobro 1965 en montara ripozloko MIEDZYGORZE (Sudetmontaro) du-semajnan Internacian Esperantistan Ferion kun abunda kultura kaj societa programo kaj kun ĉefa celo praktiki dum tiu ĉi periodo la internacian lingvon en gaja, amika kaj internacia medio.

Partoprenkostoj, kiuj inkluzivas: dormadon, 3-fojan potage manĝon, ekskursojn kaj aliajn programerojn dum 14 tagoj, estas 840 zl. = 38 levoj.

СЪОБЩЕНИЯ ОТ БЮРОТО НА ЦК НА БЕС

1. До ЦК на КПСС в Москва е изпратена следната телеграма:

Драги другари,

Позволете ни да Ви поздравим и чрез Вас целия съветски народ и неговите героични синове полковник Беляев и подполковник Леонов по случай най-новия полет в космоса и историческото събитие в космонавтиката — появата на човек в космоса вън от кабината на космическия кораб.

Да живее съветската наука и техника!

Да растат успехите на съветската наука за благото и щастието на народите, за мира в целия свят!

2. До ЦК на Румънската работническа партия, до Държавния съвет на РНР, до Министерския съвет на РНР е изпратена следната телеграма:

Скъпи другари,

Приемете сърдечните и искрени съболезнования на българските есперантисти по случай тежката загуба, сполетяла братския и съседен нам румънски народ с кончината на видния партийен и държавен деец на РРП и РНР, големия и незабравим син на Народна република Румъния др. Г. Г. Деж.

Българските есперантисти скланят глава пред паметта на Г. Г. Деж в тези скръбни дни.

3. Др. Никола Алексиев, като председател на Международния комитет на МЕМ, е изпратил следната телеграма: До Бундестага на Германската федеративна република в Бон.

Господа народни представители,

Световното есперантско движение на борците за мир (МЕМ) протестира енергично срещу проекта за амнистия на нацистките убийци през годините на Втората световна война. Този проект няма юридическа сила по международното право. Трябва всякога и без изключение да се наказват най-строго престъпленията на нацистите срещу населението на страните, окупирани от войските на Хитлер.

ŜAKA RUBRIKO

La Redakcio organizas por siaj abonantoj ŝakan konkurson. Dum la jaro ĝi publikigos ses problemojn. Por ĉiu solvo de problemo la partoprenanto ricevas poentojn, kies nombro egalas la nombron de la movoj por mato. Konsiderataj estas nur solvoj kun priskribo de la eblaj variantoj.

En la fino de la jaro al la gajnintoj estos distribuitaj tri premioj.

Ni rememorigas la ŝakterminojn kaj iliajn signojn:

Reĝo — R

Damo — D

Turo — T

Kuriero — K

Ĉevalo — Ĉ

Peono — P

Granda aroko: O—O—O

Malgranda aroko: O—O

Remiso, pato, tabulo, kampo.


PROBLEMO N^o 1.

(A. O. Löbbecke)

Por ĝusta solvo — du poentoj.

Solvojn sendu ĝis la 20-a de majo

Gvidanto: Cydra.



Mato en 2 movoj

Kontrolo. Blanko: Re2, Dg3, Tb8, Kd1, Ĉb4, P d4 (ses figuroj)
Nigro: Ra5, Kb6, Ĉc8, P: a6, d5 (kvín figuroj)

DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Geknaba E-kurso aranĝos letervesperon dum ma'io 1965 kaj atendos varmajn salutojn kaj korespondpropojn el la tuta mondo. Respondo certa. Skribu al: Ilija Ivanov, Apteĉno, urbo Loveĉ.

Irena Minkova Beeva (25-jara teknikistino, edziniĝinta), televida stacio, vilaĝo Ginci, distrikto de Sofia — interesiĝas pri tekniko kaj muziko.

Gelernantoj en gimnazio deziras korespondi en Esperanto, rusa kaj franca lingvoj pri diversaj temoj. Oni interŝanĝas E-librojn kaj gazetojn. Skribu al: „Internacia Klubo“ ĉe la gimnazio, Kubrat, distrikto de Razgrad.

KUBO

Victor Rodriguez Coffigny (Direktoro de Komerca Lernejo), str. General Fox 303, Florida (Camagüey) — kun ĉl. interesiĝas pri revuoj, gramofondiskoj, BK, ĵurnaloj.

POLLANDO

Teresa Dabrowska, ul. Jodlowa 6, Gdansk — 8, kun ĉl. pri ĉt.

USSR

Juki Mustafin, str. Proletarskaja 7, kv. 3, Olonec (Aunus), Kareljo — kun

gejunuloj el la tuta mondo pri ĉiuj temoj.

Anne Hedrikson, str. Uus 23—2, Tallinn, Estonio — 22-jara studentino de arkitekturo, interesiĝas pri arkitekturĵurnaloj kaj fotobildoj el la tuta mondo.

Eugen Tkaĉenko, kvartal 15—16, d. 14, kv. 23, Doneck — 45, Donbass — 22-jara studento, deziras korespondi pri PM (neuzitaj), unuataĝaj kovertoj, PI, insignoj, muziko, fremdaj lingvoj.

Vagif Ŝafiev, poste restante, Taŝkent 65 — kun ĉl. pri ĉt. en Esperanto, bulgara, turka kaj angla.

D-ro Tankov P. I., ul. Ostrovski, 47, 2, Soĉi — pri popolaj fizikaj kuracmetodoj (varmo, malvarmo, ŝlimo, akvo, suno, laboro, lumo, kolora kaj aliaj).

Siser Juzef, ul. Ĵuravljova 77, Rostov na Donu — kun ĉl. pri diversaj temoj en Esperanto, rusa, ukraina, angla, pola kaj serbokroata lingvoj.

Rimkevičius A. V., abon. jaŝĉik 144, Klaipeda, Litovio — 18-jara studento, deziras korespondi pri literaturo, filatelio, muziko.

Algis Jilinskas, ul. Taribine Armia 11-a, Gargĵdai, Litovio — 17-jara lernanto, dez. kor. kun ĉl. pri muziko, literaturo, sporto, PM, PK.

TRA LA GAZETARO

En ĵ. **Veĉerni Novini** — Sofio (de 27. X. 1964) informo de V. Mitev — „Renkontiĝo inter niaj kaj grekaj esperantistoj“ — pri la kunveno de societo „Maksim Gorkij“ kun partopreno de 29 grekaj geesperantistoj.

En ĵ. **„Trud“** (de 30. X. 1964), **„Oteĉestven Front“** kaj **„Zemedelsko Zname“** (de 31. X. 1964) — informo pri la elekto de At. D. Atanasov-Ada kiel membro de la Esperanto-Akademio.

En ĵ. **„Borba“** — V. Târnovo (de 6. XI. 1964) — en la rubriko „Junularaj agadkampoj“ — artikolo de Bl. Koĉeva „Floroj de la amikeco“ — la aŭtorino rakontas pri la varia agado de la Gelernanta Internacia Klubo ĉe la politeknika gimnazio en urbo Polski Trâmbeŝ kaj speciale pri ĝia vasta korespondado kun gejunuloj el la tuta mondo kun bildo — la

junpionirinoj Rumjana Nejкова kaj Darinka Evtimova trafolumas la albumojn ricevitaĵn de la gekomsomolanoj kaj junpioniroj el vilaĝo Kotelva, regiono de Poltava, USSR.

En ĵ. **„Oteĉestven Front“** — Sofio (de 10. XI. 1964) — recenzo de St. Velikov al la libro „La bulgara artiliteraturo en fremdaj lingvoj, Bibliografia indiklibro 1823—1962“ de Veselin Trajkov. En la libro estas speciala ĉapitro dediĉita al la esperantaj tradukoj el la bulgara literaturo.

En ĵ. **„Septemvri“** — Stara Zagora (de 10. XI. 1964) — informo kaj foto de P. Ĥlebarov — „Bela loko apud vilaĝo Enina“ en Balkan-montaro, kie oni konstruis kaj inaŭguris memortabulon, honore al la aŭtoro de Esperanto D-ro Zamenhof, ĝis kie oni povas promeni vintre kaj somere.



En ĵ. „**Narodno Delo**“ — Varna (de 11. XI. 1964) — artikolo de Filipo Franĉeski el Padova, Italio — „Bulgario estas mia dua naskiĝlando“ — la aŭtoro rakontas precipe pri la beleco de la plaĝo „Orkolora Strando“ apud Varna.

En ĵ. „**Zemedelsko Zname**“ — Sofio (de 14. XI. 1964) — artikolo „La patrolanda libro — en ĉiuj lokoj de la mondo“ — en kiu oni rakontas pri la agado de la Fremdlingva Eldonejo, kiu eldonas librojn, gvidlibrojn, revuon „Bulgario“ k. a. ankaŭ en Esperanto.

En ĵ. „**Oteĉestven Glas**“ — Plovdiv (de 14. XI. 1964) — informo de Iv. Bataklijev — „Kurso por instruantoj de Esperanto“, kiun malfermis la Fakto „Klerigo“ ĉe la Distrikta Popola Konsilantaro, la Unuiĝo de la Instruistoj kaj la Esperantista Societo „Kulturo“ en Plovdiv. La kurson gvidas Penĉo Petrov kaj en ĝi partoprenas instruistoj el Plovdiv, Pârvomaj, Asenovgrad, Belozem, Manole kaj aliaj loĝlokoj.

En ĵ. „**Septemvrijsko Zname**“ — en urbo Kneĵa (de 7. XII. 1964) — sub la rubriko „Esperantaj sciigoj“ — oni informas pri malfermo de kelkaj kursoj en diversaj lernejoj por komencantoj kaj kurso por progresintoj kaj pri aliaj aferoj.

En ĵ. „**Narodna Kultura**“ — Sofio (de 12. XII. 1964) — artikolo de Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA, pri la tago de la esperanta libro — la 15-an de decembro — konekse kun la monato de la esperanta libro en Bulgario — la monato decembro.

En ĵ. „**Balkansko Zname**“ — Gabrovo (de 6. XII. 1964) — informo de Iv. Gânzov pri malfermita kurso en urbo Trjavna. Kursgvidanto k-do Pavel Hârlov.

En ĵ. „**Naroden Drugar**“ — Jambol (de 14. XII. 1964) — artikolo de Bojan Kuŝev „L. L. Zamenhof — granda humanisto kaj batalanto por paco“ (okaze de la 105-jara datreveno de la naskiĝo de l' kreinto de la lingvo internacia Esperanto) kun portreto de Zamenhof.

En ĵ. „**Narodno Delo**“ — Varna (de 19. XII. 1964) — informo, ke en la sama tago la esperantista societo „Albatro“ okazigos solenan vesperfeston okaze de la 105-jara datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof.

En ĵ. „**Ludogorska Pravda**“ — Razgrad (de 19. XII. 1964) — artikolo de Canko Murgin „Triobla Esperanto-Jubileo“, en kiu la aŭtoro rakontas pri la 75-a jara datreveno de la fondiĝo de la unua esperantista klubo en Bulgario (en Sofio), de la eldono de la unua Bulgara lernolibro de Esperanto, kaj de la apero de numero unua de la unua bulgara (kaj dua en la mondo) gazeto „La mondlingvisto“.

En ĵ. „**Zarja na Komunizma**“ — Loveĉ

(de 21. XII. 1964) — artikolo de Ilija Ivanov „Varia agado de la esperantistoj en Loveĉ“. La aŭtoro rakontas pri la agado de la societo: organizo de solenaĵo dediĉita al Zamenhof kun prelego de Kolju Panĉev, prezidanto de la societo, pri malfermo de 5 kursoj por komencantoj: por civitanoj (kursgvidanto K. Panĉev), por lernantoj en lernejo „Nikola Iliev“ (kursgvidanto Asen Matev, direktoro de la lernejo), en gimnazio „Todor Kirkov“ (kun kursgvidanto Ilija Ivanov), du kursoj en Maŝinkonstrua mezlernejo ĉe uzino № 14 (kun kursgvidantoj Kina Uzunova kaj Vasil Markov); kurso por progresintoj (kun kursgvidanto K. Panĉev). Pli ol 100 personoj nun lernas la internacian lingvon.

En ĵ. „**Dunavska Pravda**“ — Ruse (de 28. XII. 1964) — informo de J. Dimitrov — pri solenaĵo okaze de la 105-jara datreveno de Zamenhof kun prelego de Jordan Kazakov.

En ĵ. „**Septemvri**“ — Stara Zagora (de 10. XII. 1964) — artikolo de D. Martinov, prezidanto de E-societo „Roza Valo“ en Kazanlâk „Nia ora libro“ — pri la impresoj de eksterlandaj gastoj, vizitintaj la societon.

En ĵ. „**Trud**“ — Sofio (de 25. XII. 1964) — informo de A. Velikov „Liberon al la hispanaj politikaj malliberuloj“ — pri la protesta telegramo de la sofiaj esperantistoj por liberigo de la politikaj malliberuloj en Hispanio.

En ĵ. „**Narodna Mladeĵ**“ — Sofio (de 30. XII. 1964) — artikolo de E. Daskalov „Monato de la Esperanto-libro“ — pri la agado de la gejunuloj-esperantistoj en Vraca konekse kun la monato de la E-libro.

En ĵ. „**Septemvri**“ — Stara Zagora (de 3. I. 1965) — artikolo „Kun la Esperantista insigno“ de Blago Dimitrov — pri ekskurso en Pollando kun du bildoj de Krakov.

En ĵ. „**Zemedelsko Zname**“ — Sofio (de 15. I. 1965) — artikolo de Danko Dimitrov „La poemo „Septembro“ tra la mondo“, en kiu la aŭtoro mencias ke jam en 1931 la poemo „Septembro“ de Geo Milev aperis en Esperanto en Leipzig.

En ĵ. „**Narodna Kultura**“ — Sofio (de 16. I. 1965) — artikolo de Nikola Aleksiev „Kampanjo por la paco“. La aŭtoro rakontas pri „La Jaro de la Internacia Kunlaborado“.

En ĵ. „**Oteĉestven Front**“ — Sofio (de 21. I. 1965) — artikolo de V. Vereniŝka „Hirunda Nesto“ — kun bildo titolita „El la familia albumo de Elenov — Leciono de Esperanto“.

En ĵ. „**Iskra**“ — Kazanlâk (de 23. I. 1965) — artikolo de Dimo Martinov „La esperantistoj-batalantoj por paco“; la aŭtoro rakontas pri la societa jarkunveno, pri la estonta agado kaj pri la kolektado de subskriboj okaze de „La Jaro de la Internacia Kunlaborado“.



METALURGIA UZINO

tenin

PRODUKTAS:

Armaturaj stangoj, cirkla dia.
6.5 ĝis 32 mm

Perioda fervoja transportma-
terialo de № 14 ĝis № 32

Plata fero, de 35/10 ĝis 50/12
mm, 100/10÷22 mm kaj
160/30 mm

Rondaj ferstangoj por maŝin-
konstruado, dia. 50÷400 m

Angulfero № № 6÷10

Folditaj stangoj № 10

Kvadrataj stangoj 50×50 mm

Lamenigita fero de № 35 ĝis
3 mm

Zinkita fero de № 0.45 ĝis 3 mm

Dikfolia fero de 4 ĝis 30 mm

Fandeja muldfero

Ŝtalfandaĵoj

Oksigeno

Fandfornega skorio

Skoria lano kaj felto



Eksportisto: Rudmetal, Sofio

ENHAVO

Paĝo

Ĉefartikolo. Al pli alta nivelo nia kulturkleriga agado! (Ĥr. Gorov)	1
M. Benvenisti. Nova esperantista manifestiĝo en Sofio	2
* * * La Jugoslaviaj Geesperantistoj dankas	3
Iv. Ŝivarov. Raporto pri la agado de MEM-sekcio en Plovdiv	3
* * * La malaprobata rakonto de Tolstoj	4
* * * Eroj — strangaj kutimoj	4
Georgi Deŝkin. Antaŭ lasta drivo	5
Nikola Uzunov. Medito	5
Toma Ajolov. La Esperantisto	5

JUNA ESPERANTISTO

* * * Alvoko pri aliĝo rilate al la tutlanda junulara konkurado — 1965	6
* * * Световният есперантски съюз кандидат за Нобеловата награда за мир	8
Д. Сертов. Това ни вдъхновява	9
Д. Ъдраков. Jen estas vera Esperantujo	10

ORGANIZA VIVO

B. Kavalĝiev, K. Cvetkov, D. Ŝiŝkov, C. Dimitrov, K. Paspalov, N. Uzunov, Ĥr. Dimitrov, P. Pamporov, E. Daskalov	13
Iv. Ŝivarov. 50 esperantlingvaj prelegoj dum 1964	14
G. Dimov. Nova stelo sur la verda firmamento	15
* * * Turista kroniko	15
* * * Съобщения от бюрото на ЦК на БЕС	17

Kovrila paĝo: Ripozdomo de la Sindikatoj en Velingrad, mineralakva restadejo

Abonkotizo: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por tiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B-162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.




ŜTATA KOMERCA ENTREPRENEJO „ELEKTROIMPEKS“ — BULGARIO

SOFIO — str. G. Vaŝington 17 Telefono: 8-49-91
Teleks: 575

EKSPORTAS:

GRANDAN ELEKTON DE MODERNAJ
RADIORICEVILOJ KAJ TELEVIDILOJ:

— MEZGRANDA SUPER — „MELODIO“
KAJ GRANDA SUPER — „SIMFONIO“ — 11



— STEREO-RICEVILOJ „SIMFONIO“ — 10
KAJ SIMFONIO — 11
— LA RADIORICEVILOJ „ROMANS“,
„KONCERTINO“ KAJ „MEĈTA“
— LA MUZIKAJ ŜRANKOJ „HARMONIA“ — 10,
„HARMONIA“ — 10 STEREO KAJ „LIRA“ — 10
— RADIOGRAMOFONO „AKORD“ — 10,
„AKORD“ 101 KAJ „AKORD“ — 102
— TELEVIDILOJ „OPERA“ KAJ „KRISTAL“

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Dimitr ĴDRAKOV, Emil KEREMIDĈIEV, Atanas LAKOV,
Ivan SARAFOV (ĉefredaktoro), Simeon D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV

Adreso de la redakcio:

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 3-26-82

